335 (05)

9-a JARO, N-o 406 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25. JUNIO 1933

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO.
ADMINISTREJO: 23, rue Boyer, Paris 20e.

Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT (1932-1933)

A. Raporto de la Direkcio

Funkciado de la Plenum-Komitato. — Nenia ŝanĝo okazis en la konsisto de la Direkcio (6 K-doj el Parizo); depost la likvido de l'Administracio en Lajpcig K-do Lerĥner ne plu estas P.K.-ano.

La Direkcio regule kunsidis ĉiudusemajne k ne estis opinia malkonsento pri la decidoj faritaj. K-do *Kaŝon* (Cachon), pro tio ke li loĝas eksterurbe, ne ofte povis ĉeesti la kunsidojn; tamen li aprobis la decidojn laŭ la protokoloj, kiujn li ricevis. Pro la baldaŭa finiĝo de la mandato de la nuna P.K. ni ne okazigis elekton de anstataŭanto por tiu K-do.

Elekto de nova P.K. — Ni publikigis alvokon konforman al la Statuto en la n-ro 402 de « S-ulo », limigante la sinanoncon de kanditatoj ĝis la 5. majo 1933. En la n-ro 405 ni devis sciigi, ke ne prezentiĝis iuj kandidatoj k ni plilongigis la limtempon por sinanonco ĝis nedifinita dato. Pro tio, ke K-do Lanti nepre volas fordoni sian gvidpostenon, la nuna P.K. ne renovigis sian kandidatecon.

Ĝeneralaj laboroj. — La gvidado en ĉi tiu periodo estis aparte malfacila pro la ekrego de l'nacisocialismo en Germanio, sekve de kio ni devis translokigi senprokraste el tiu lando la administracion k ankaŭ ŝanĝi la presiston. Parto de la librostoko estas transkondukita al Parizo; grandan parton bonvolis ankaŭ deponi niaj K-doj en Stokholmo, kiuj pro tiu faro estas speciale dankindaj. La translokigo okazis glate, t.e. nenia materialo (libroj, librotenado, ktp.) perdiĝis. Sed altaj estis la transport- k dogan-kostoj. Krome restis en Lajpcig skribmaŝinoj, adresil-maŝino k multobligilo, kiujn ni ne povis venigi al Parizo. SAT perdas sekve tamen en ĉi tiu malfacila periodo...

Ĉe la ŝanĝo de l'presejo ni havis neantaŭvideblajn malfacilojn. La unua, al kiu ni transdonis la laborojn, sufiĉe granda entrepreno, kiu presadis jam multe en esp-o, — sed ne gazetojn, nur librojn — laboris kun tiaj prokrastoj, ke la gazetoj aperis tute malregule k la tuta administra aparato suferis pro tio. Speciale ĉagrene estis por ni, ke la ekspedo de « La Lernanto " por esti aldonata al la sveda LEA-organo, okazis kun granda prokrasto k kaŭzis apartajn elspezojn k gravan domaĝon al la tieaj K-doj. Ni konstatas, ke la presisto trompis nin komplete, mensogis pri la datoj de l'ekspedo k fuŝis ĉiurilate. Ni tiam (en majo) decidis pri refoja ŝanĝo de l'presejo. En Parizo la prezoj estas tro altaj; ni devis klopodi ĉe provincaj presejoj. Nun la presado okazas en Annemasse ĉe la landlimo de Svisio. Nenian kulpon havas pri la prokrastoj redakcio k administracio.

Ni volas ĉi-loke ankoraŭ esprimi nian kontenton pri la preslaboro farita de la presejo Vetig, kie oni prizorgis niajn presaĵojn kun SAT-aneca spirito. Estu ĉi-okaze menciite, ke K-do Oskar Vetig, kiun la partoprenintoj ĉe la Ŝtutgarta Kongreso bone memoras, estas jam delonge en Hitlera internigejo k estas tre kruele traktata. K-dino Vetig povis rifuĝi en Vienon.

Administracio. — Ekde 1. aprilo 1933 fakte la administraj laboroj estis farataj grandparte en Parizo (de K-doj Banmer k Bartelmes). K-do Lerĥner, kiu ĝis tiam prizorgis la tutan administran laboron, restis dungita ĝis la 31. majo 1933, k parto de la salajro estis pagata al li ankoraŭ ĝis mezo de junio 1933, laŭ propono de la Admin. Komisiono en Lajpcig.

Ĉi lasta raportis regule al la Direkcio pri la stato de l'administracio k gvidis la likvidon de l'administrejo en Lajpcig. Tamen detala kontrolo pri materialo k kontoj okaze de la translokigo al Parizo laŭŝajne ne estis farata de la komisionanoj, k la senŝarĝigo donata tiurilate, povas havi nur formalan valoron.

Redakcio. — K-do Bartelmes restis dungita por prizorgi la redaktajn laborojn sub la gvidado de K-do Lanti; poste K-do B. prizorgis ankaŭ la administrajn laborojn rilatajn al la gazetoj. Depost la deviga ŝanĝo de l'presisto la korektlaboroj de l'redaktoro fariĝis pli malfacilaj, k ĉiu presprovaĵo devis esti korektata dufoje ĉe la nova presejo. Interkonsente kun la Direkcio eldoniĝis kelkaj specialnumeroj (la 400-a, la maja S.R.) k duobla n-ro de S. R. por junio-julio sekve de la malfaciloj, kiujn ni havis per la ŝanĝo de la presejo.

Kontrol-Komitato ne funkciis dum la tuta jaro. La en Ŝtutgarto elektita sekretario, K-do Z. el Chemnitz (Germ.), jam frue sciigis nin pri nepovo plenumi la akceptitan taskon, pro senlaboreco k mizerstato. La Kongreso devos zorgi pri anstataŭantoj.

Rilatoj kun L.E.A. — Tiuj L.E.A., kiuj jam ĝis nun agis konforme al la Gotenburga Konvencio (precipe la nederlanda, sveda k franclingva), daŭrigis siajn amikajn rilatojn kun SAT. Por plifirmigi tiujn rilatojn estis, kiel oni memoras, proponita en Ŝtutgart la realigo de projekto, celanta liveradon devigan de « S-ulo » al la LEA-anaroj. La iniciatintoj mem, SEA-estraro, kiu jam principe k en la detaloj estis akceptinta la efektivigon, pro la novaj cirkonstancoj en Germanio devis rezigni. Nur la Nederl. LEA depost julio 1933 realigos la planon, k ĉiuj NFLE-anoj ricevos ekde julio « S-ulo » n. La ceteraj aŭ ne ankoraŭ decidis aŭ malakceptis (F.E.O.) — pro la kotizplialtigo ligita kun ĉi tiu afero. La Pariza FEO-grupo tamen akceptis la

projekton por sia membraro (ekde jan. 1934).

La aŭstria LEA (ALLE), kvankam ĝi formale akceptis la Gotenb. Konvencion, neniel plenumis ĝiajn punktojn. Okazis nenia varbo por SAT en ĝia organo « La Socialisto »; male, aperis diversaj malrekomendaj artikoloj k tiaj, kiuj preparis la skismon k kreon de propra Internacio. Ni konstatas ĉi tie publike, ke de nia flanko nenio okazis por motivigi la skismigan agadon. Neniaj artikoloj estis rifuzataj. La proponoj de ALLE estis larĝe diskutataj ĉe la XII-a Kongreso; la granda plimulto malakceptis tiujn proponojn : laŭ ĉia demokratia regulo do la malplimulto estus devinta sin klini, anstataŭ surpaŝi la skismigan vojon, imitante la pli fruajn skismulojn.

Estu notite ĉi tie, ke la malvarbadon de ALLE ni provis kompensi per intensigita varbado en Aŭstrio. Tie ekfunkciis ĉefperanto, kiu liveradis al ni adresojn de aŭstriaj ne-SAT anoj, al kiuj ni sendis varbilojn ktp. Laŭ lia raporto, ĉefe la terura mizerstato de la aŭstriaj K-doj malebligas la aliĝon al SAT.

Eldonagado. — Dank' al la helpo de la Ned. FLE-Libro-Servo aperis *Gvidilo tra la Esperanto-Movado* (de Bruin), *Fremdvortoj en Esperanto* (Neergaard), ĉi lasta ankaŭ helpe de individuaj antaŭmendoj; plie aperis per mono kolektita de anarkistaj K-doj *Liberecana Socio*. Por povi aperigi la libron de Blumental pri « liberigo de l'mon- k interez-regado », ni bezonus multe pli da antaŭmendoj[1]. Ni havas ankaŭ multajn aliajn prespretajn manuskriptojn, kiuj ĝis nun ne povis esti eldonataj pro manko de mono. Por la dua eldono de la « Plena Vortaro » ni havas ankoraŭ nenian financan bazon.

Ankaŭ la *Jarlibron* aperigi malpermesis la financa situacio, k cetere ankaŭ ne oportunas pro la cirkonstancoj en Germanio (estus tro da sennomuloj en tiu adresaro !). (Vd. pri tio n-ron 405.)

Kongres-preparo. — La decido pri elekto de Stokholmo kiel kongresurbo de la XIII-a okazis laŭ la rekomendo de la plimulto en la Ŝtutgarta Kongreso. La Organiza Kongres-Komitato laboris inter-konsente kun ni. Aperis en « S-ulo » multaj komunikoj pri la stato de l'preparlaboroj same kiel interesaj artikoloj pri la kongresurbo, ktp.

Resumo pri la situacio. — La statistikoj, kiuj aperos en la venonta n-ro, permesos mezuri la progresojn k malprogresojn faritajn depost la lasta jaro. Ni devas substreki, ke la situacio multe plimalboniĝis per la situacio en Germanio, k ke la K-doj el la landoj, kie regas ankoraŭ la demokratio, devos ankoraŭ multon fari, por ke la perdoj ekvilibriĝu. Oni devas pripensi, ke nun en pli k pli da landoj SAT renkontas malfacilojn : la cirklo de la diktaturlandoj pli k pli larĝiĝas. Se en Sovetio tamen kelkaj K-doj sukcesis gardi la kontakton kun nia Asocio, tio okazis en plej malfacilaj k penigaj kondiĉoj k nur helpe de artifikaj rimedoj sufiĉe elspezigaj. Kun bedaŭro ni devas konstati, ke la malpermeso al niaj *multnombraj* — necesas ja substreki — amikoj en tiu lando esti en niaj vicoj k legi niajn organojn, restis absolute severa. Tamen ekzistas koraj ligoj, kiuj neniam disŝiriĝas, k eĉ sub la distorda masko de la IPE-aj bulten-informoj niaj amikoj sciiĝas, ke nia Asocio vivas k restas sur sia batalposteno.

Pri Germanio ni ne povas doni definitivan bildon. La malmendoj ĝis nun faritaj ne estas ĝeneralaj, sed nur sporadaj. Tamen pri tio ni ne havas grandan optimismon rilate al la estonto.

La ĝojigaj progresoj de nia movado en Nederlando k ankaŭ iom alie k precipe la decido de la Ned. LEA pri abonigo de sia tuta anaro al nia oficiala organo « S-ulo » estas tamen kuraĝigaj signoj k rajtigas gardi la esperon por la estonto.

(Daŭrigota.)

[1] Ni ricevis ĝis nun 68 antaŭmendojn je tiu libro : 300 pagataj antaŭmendoj estas minimume bezonataj. Prezo : 9.— fr. fr.

XIII-a Kongreso de SAT en Stokholmo

(5-a — 10-a de aŭg. 1933).



Kvina komuniko

TENDARO : Fine OKK sukcesis solvi la demandon pri tendaro. Ĝi havos lokon ĉe Elta (Ålta) sude de Stokholmo. Proksime de akvo k kun multaj diversaj komunikiloj por atingi ĝin. Ni esperas, ke la Gek-daro estos kontenta.

LOĜEJOJ : Kelkaj el la Gek-doj anoncis loĝejojn, kiuj estos disponigataj tute senpage. Tamen estas nur malmultaj. La plejmulto povos trovi komfortan loĝejon por po 1, 25 kr. tage. OKK tamen, tuŝante tiun ĉi problemon, kun bedaŭro konstatas, ke la aliĝoj ankoraŭ ne venis en tia kvanto, ke oni povus riski plurajn paŝojn por akiro de pli multaj tiaj loĝejoj. Temas ja pri devo, kiam oni kontraktas pri tiaj aferoj k OKK ne volas riski grandajn sumojn por tio. *Ni jam alvokis en la antaŭa n-ro por tuja aliĝo, se oni deziras havi malmultekostan loĝejon.*

Nature ekzistas ankaŭ hotelaj ĉambroj, sed ili estas pli multekostaj : 2,50 kr. por plena tago (k pli alte). En hotelo « Elim » estas esp.-parolanta K-dino.

GVIDLIBRO : Kune kun ETK (Turista Komisiono) ni eldonos specialan gvidlibron tra Stokholmo, kiu indikas la vidindaĵojn de Stokholmo k la horojn, kiam oni povas viziti ilin; plie ĝi enhavos historian priskribon.

KONFERENCOJ : Ni petas insiste al la Gek-doj, kiuj volas aranĝi specialajn frakciajn k metiistajn kunsidojn k konferencojn, senprokraste sciigi tion al OKK, ĉar ankaŭ pri tiu afero la antaŭlaboro devas esti farata kiel eble plej baldaŭ.

Ekspozicio : Al Gek-doj, kiuj havas specialaĵojn, ni petas aŭ donaci aŭ pruntedoni por la ekspozicio, kiu nature devas esti kiel eble plej ampleksa, por pruvi al la laboristaj gvidantoj k al la publiko, ke nia lingvo enpenetris en ĉiuj medioj de la socio. Bonvenaj estas ankaŭ gazetoj, speciale el pli ekzotikaj landoj k el Balkanlandoj, krome ĉiaspecajn turist-broŝurojn k.a. aferojn ni danke akceptas.

GRAVE : Ne prokrastu vian anoncon pri partopreno ĝis la lastaj tagoj antaŭ la kongreso. Aliĝu jam nun, se vi deziras havi loĝejan avantaĝon.

Proksimuma Programo

Sabate, la 5-an de aŭg. : Akcepto de la kongresanoj ĉe trajnoj k ŝipoj.

Je la 8-a h. Malfermo de la akceptejo en Domo de l'popolo, Barnhusgatan 14.

Je la 11-a h. Kunveno de IFETT.

Je la 14-a h. Unua lekcio de Lab. Altlernejo.

Je la 19-a h. Interkonatiĝa vespero.

Dimanĉe, la 6-an de aŭg. je la 12.30 h. Kolektiĝo sur la norda relvoja placo (proksime de la kongresejo) por fotografado. Poste marŝo al Remparo (Skansen) tra la urbaj stratoj. En la liberaera muzeo *Remparo* okazos paroladetoj de fremdlandaj K-doj kun svedlingva traduko. Poste sekvos koncerto de Tramistara orkestro k studvizito al la vidindaĵoj en Remparo sub gvido de Stokholmaj K-doj.

Je la 19-a h. Solena malfermo de la kongreso en la salonego de Koncerta domo, kie okazos koncerto de orkestro de A.B.F., kanto de « Kantobirdaro », orgenaj solaĵoj de direktoro Patrik Vretblad, paroladoj de K-do Lanti, (evtl.) de sveda ministro el la socialista registaro nuna, kongreskomitata prez. K-do Ernst Eriksson. Mallongaj salutparoloj de politikaj k faksindikataj gvidantoj.

Lunde, la 7-an de aŭg. je la 9.30 h. Malfermo de la unua laborkunsido. Elekto de prezidantaro, sekretarioj, proponkomisiono k.a. Salutvortoj de reprezentantoj el la landoj ĉeestantaj. Lego de jar- k revizia raportoj k diskuto pri ili.

Je la 12-a h. Manĝopaŭzo. Malkaraj manĝoj en Normakafejoj.

Je la 14-a h. Konferencoj de frakcioj socialista, anarkista, sennaciista k komunista.

Je la 19-a h. Honora akcepto ĉe la urbestraro en la ora salono de Urba domo. La kongreson salutos unu el la urbaj prezidantoj, sekvos speciala programo, la urbo donos manĝon al la kongresanoj, okazos kanto, muziko ktp.

Marde, la 8-an de aŭg. Je 9.30 h. Dua laborkunsido. Daŭrigo de la traktoj pri la agadraportoj k proponoj alvenintaj.

12-a h. Manĝopaŭzo.

14-a h. Tria laborkunsido.

18-a h. Lekcioj pri Kooperativa Asocio Sveda.

20-a h. Konferencoj de metiistoj. Cetere libervole.

Merkrede, la 9-an de aŭg. Je 9.30 h. Kvara laborkunsido (Lekcioj ev.).

12-a h. Manĝopaŭzo.

14-a h. Studvizito al Konsum-bakejo k al la Lumafabriko. (Laŭ grupoj).

20-a h. Kunsidoj k konferencoj de frakcioj k metiistoj.

Jaŭde, la 10-an de aŭg. Je 9.30 h. Studvizito al Gustavsberg por pristudo de la tiea porcelanfabriko. Vojaĝo per ŝipo tra la plej bela parto de l'Stokholma arkipelago. Dumvoje restado du horojn en Tollare, kie samtempe okazos paca konferenco. Reveno en la urbon denove ĉirkaŭ la 20-a h.

Vendrede, la 11-an de aŭg. Postkongresaj ekskursoj (se anoncos sin sufiĉa nombro da K-doj. Marŝo al vidindaĵoj en Stokholmo sub gvido de Stokholmaj K-doj). Interalie « La dometaro », kiun laboristoj mem konstruas helpe de la urbo, Kooperativaj domegoj, ktp.

Se sufiĉa nombro sin anoncos, okazos gimnastiko ĉiumatene pere de Laborista Altlernejo.

Tiun gimnastikon gvidos K-do Paul Neergaard, Kopenhago, kiu ankaŭ prizorgas la Laboristan Altlernejon.

Poŝtoficejon starigos la koncerna instanco en la granda halo de Domo de l'popolo (apud la akceptejo), kun speciala stampilo. Esperanto-parolanta deĵoristo. La poŝtoficejo prizorgos ĉion rilate al poŝtaj aferoj.

Bankaferojn traktos Södermanlands Enskilda Bank, kies filio *G.* estas apud la kongresejo, k en kiu deĵoros multlingvulo,

3-a listo de aliĝintoj

48 David Klasson, Mantorp, Svedio.
49 Leendert de Haan, Schiebroek, Nederl.
50 V. Bonde, Falun, Svedio.
51 A. de Vries, Amsterdam, Nederl.
52 E. Gans (gastino), Amsterdam, Nederl.
53 G. Dodebier, Apeldoorn, Nederl.
54 M. Medema, Borger, Nederl.
55 A. J. Bienefelt, Delft, Nederl.
56 Frans ten Hagen, Amsterdam, Nederl.
57 Gerardo Roelofs, Amsterdam, Nederl.
58 Jacob Koomen, Assendelft, Nederl.
59 Fritz Johansson, Höganäs, Svedio.
60 Carl H. Johansson, Falköping, Svedio.
61 (Gastino) Eva Julin, Stockholm, Svedio.
62 Teodor Julin, Stockholm, Svedio.
63 John Berglund, Umeå, Svedio.
63 K-dino Margaretha Almqvist, Oslo, Norvegio.
65 Einar Gabrielsen, Oslo, Norvegio.
66 Martin Muribö, Oslo, Norvegio.
67 Arthur Solberg, Oslo, Norvegio.
68 Thorbjörn Smådahl, Oslo, Norvegio.
69 Monrad Sundsby, Oslo, Norvegio.
70 Adolf Sörensen, Oslo, Norvegio.
71 K-dino Augot Ween, Oslo, Norvegio.
72 Koc Vaclav, Plzen, Ĉeĥoslovakio.
73 Hans J. Honeder, Linz, Aŭstrio.
74 Franz Mittermayer, Linz, Aŭstrio.
75 K-dino Marie van Essen, Marken-Binnen, Nederl.
76 Johano Lok, Amsterdam, Nederl.
77 Paulo Meyer, Parizo, Francio.
78 E. Larsson, Spanga, Svedio.
79 K-dino Maria Larsson, Spanga, Svedio.
80 Erik Olsson, Landskrona, Svedio.
81 K-dino Stina Persson, Stockholm, Svedio.
82 Gudm. Söderström, Stockholm, Svedio.
83 Valfrid Nordlöf, Stockholm, Svedio.
84 E. Glöckner, Skoghall, Svedio.
85 Axel Eriksson, Stockholm, Svedio.
86 Hild. Rynolf, Falun, Svedio.
87 D. Versluis, Zwolle, Nederl.
88 J. Lievestro, Zwolle, Nederl.
89 A. Veen, Amsterdam, Nederl.
90 K-dino M. Veen, Amsterdam, Nederl.
91 G. Bouchard, Ĝenevo, Svisio.
92 Elsa Lindberg, Stockholm, Svedio.
93 Karl Karlsson, Nynäshamn, Svedio.
94 J.M. Kerr, Denver Colo., Usono.
95 M.M. Weber, Denver Colo., Usono.
96 Willy Burgemeister, Warnsdorf, Ĉeĥoslov.
97 Birger Karlsson, Amal, Svedio.
98 E.A. Karlsson, Stockholm, Svedio.
99 Evert Lord, Varberg, Svedio.
100 Joel Sulsky, Luton, Anglio.
101 P. Krijt, Amsterdam, Nederl.
102 J.W. Minke, Amsterdam, Nederl.
103 Annie Cachet, Amsterdam, Nederl.

Vivu la neŭtralismo !

Ni represas hodiaŭ ĉi tiun artikoleton, kiu aperis siatempe en « S-ulo » k poste en « Vortoj » (p. 73), ĉar ni opinias ĝin denove tre aktuala en la nuna momento, konsidere la situacion en Germanio. — *Red.*

Oni jam atentigis min pri neceso ne tro paradoksi en miaj diroj.

Tute prave!

Sed la vivo, la faktoj ne malofte paradoksas. Kaj ni devas atenti la vivon, la faktojn...

Sendube la plej « ortodoksaj » marksistoj konsentos, se mi asertas, ke la socia vivo estas sinsekvo de kontraŭdiroj. Ne ekzistas absolutaj veroj, krom eble en la abstrakta, matematika kampo. Veroj ĉiam rilatas al tempo, loko, forto, cirkonstancoj, ktp.

Sed sufiĉe da ĉirkaŭfrazoj ! Mi simple intencas krii : Vivu la neŭtralismo ! Jen cinika konfeso pri « revizemo ».[1]

Bonvolu tamen ne tro rapide finjuĝi pri tiu mia « krimo »[1]*...*

Vero estas, ke en la landoj, kie regas blanka teroro, nia SAT-movado ne povas malvolviĝi normale. Tie « S-ulo » k aliaj SAT-eldonaĵoj ne povas eniri libere. Sufiĉas esti posedanto de membrokarto de nia Asocio por esti suspektata, arestata, malliberigata.

Nu, ĉu do ni simple notu la fakton k rezignu ? Estus tute maltrafa oportunismo ! Kie SAT estas malpermesata, kie niaj anoj ne povas kolektiĝi sub nian ruĝan flagon, tie ili devas ŝirmi sin per la nure verda ; ili devas partopreni la neŭtralan, burĝan, eĉ faŝistan esperantan movadon...

Ne gravas, se laboristo ricevas esperantan instruon de pastro, de faŝisto. Esperanto estas ilo, — ilo nepre necesa por la emancipo de nia klaso. Oni do ne timu ricevi ĝin de malamikaj manoj. La ĉefaĵo estas posedi la ilon k scipovi lerte ĝin uzadi. Aliiĝos la cirkonstancoj en la blankaj landoj ; venos certe la tago, kiam estos eble utiligi malkaŝe la akiritan k bone akrigitan ilon por niaj klasaj celoj.

[1] Aludo al riproĉoj faritaj ĉe la Lajpciga Kongreso. — *E.L.*

Kiuj ne komprenas ĝin, kiuj krias : « For la neŭtralismon ! » en la terorlandoj, ĝiuj, en plej bona okazo, estas blindaj fanatikuloj, aŭ simple provokistoj...

La vera kuraĝo ne konsistas el fanfaronaĵoj ; vera heroo ne oferas senbezone sian vivon ; male li ŝirmas zorge sian bruston por batali venke, kiam la cirkonstancoj fariĝos favoraj.

La vera kuraĝo ankaŭ estas diri la veron, eĉ kiam ĝio povas domaĝi al la verdiranto...

Sed, kompreneble, ju pli la cirkonstancoj devigas nin rezigni provizore niajn principojn en la blankaj landoj, despli ni devas rigore apliki ilin ĝie, kie regas ankoraŭ la burĝa demokratio.

Vivu la neŭtralismo ! ĝie, kie nia obeinda, sed ne obeebla agitvorto : « For la neŭtralismon ! » riskas detrui tute la esperantan vivon...

25-VIII-1929. E. L.

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Ne sufiĉas krii devizon « Proletoj de la mondo unuiĝu vin »...

En « Juna Esperantisto » (n-ro 4) *Rudolphus* skribas pri la nuna neprospero de esp-o en Sovetio, nominte kiel plej gravan faktoron la instrumetodon : « ... Dua grava faktoro estas la manko de esp. gazetoj en Sovetio. Se ni rigardas eksterlanden, en ĉiuj landoj ekzistas aro da div. esp. eldonoj, diversaj periodaj legaĵoj. Sed en Sovetio... ekzistas nur « Bulteno de SEU » aperanta ĉiumonate, sed fakte ĝi aperas kun malfrueco dum 2-3 monatoj. Jes, estas unu ĵurnalo, sed tute rusa kun nomo « Internacia Lingvo », sed ĉi legaĵo estas taŭga nur por plenaĝuloj, sed ne por junularo aŭ komencantoj... Kaj tria faktoro, la malbonaj cirkonstancoj. Kaj malfavora atentemo al esp-o : oni ĉiam preferas anglan, germanan, sed ne lingvon internacian... » — Ĉu Rudolphus do rekomendas krei pliajn enlandajn (sekve *naciajn*) esp. gazetojn ? Legante liajn vortojn oni havas tiun impreson. Manko de esp. gazetoj en Sovetio ? Nu, certe : oni fermis ja la landlimon kontraŭ mondskalaj esp. gazetoj, kiaj estas la SAT-organoj ! !

Optimismo...

En artikolo de la « Majstro »(?!)[1] en « Frateco », monata gazeto por frateca vivo, n-ro 6, jenaj paroloj niaopinie iom riskaj, sed verŝajne akcepteblaj por kreduloj el la Frataro : « ... Nun ni estas en epoko, kiam la mondo denove kreiĝas. La mondo ordiĝos, k ni ĉiuj partoprenas en ĝia ordigo. La ordigo de la mondo jam estas demando *de tagoj, ne de jaroj...* »

Kongreso kun « se »-oj.

En « Hungara Heroldo », n-o 2, ni legas : « Hungara Esp. Kongreso okazos somere en Nagymaros, *se* la vilaĝestraro invitos ĝin k *se* almenaŭ la kvarono de la komitatanoj de HES k la membroj de aliaj hungaraj esperantistoj (*tiel* !) certigas sian partoprenon ».

Ni deziru, ke la vilaĝestraro ne hezitos, la komitatana kvarono estos mobilizebla k ke la aliaj esp-istoj ĉeestu ne nur kun siaj membroj, sed ankaŭ kun sia kapo, ĉar oni espereble ne nur dancos, sed ankaŭ kunsidos !

Post ŝtormo - zefiro.

Sub tiu titolo « Bulteno de ĉeĥoslovaka Lab. Ligo Esperantista» (aprilo) konkludas pri la rezultoj de la Liga jarkunveno : « ... Iom post iom enradikiĝas en niaj vicoj la liberpensado, la kritika spirito. Oni komencas respekti la opiniojn de alipensantoj k provas lumigi ties impulsojn per la unika instrumento, la senpasia racio ».

Do, antaŭen, K-doj el Ĉeĥoslovakio, por ke viaj klopodoj estu kronataj de definitiva sukceso !

Kontraŭ la faŝismo !

En n-ro 3 (aprilo-majo) de « Arbeider-Esperantisten » (Oslo) la Norv. Asocio de Esp. Laboristoj publikigas energian proteston kontraŭ la Hitlera reĝimo. Ankaŭ ĝi kontraŭstarigas (en nacia lingvo) leteron ricevitan de germana K-do al la senhonta hipokritaĵo, kiu aperis en « Heroldo » rilate la situacion en Germanio. Ĉi tiu n-ro estas bele prezentita k la titolo estas presita ruĝkolore okaze de la Maja tago.

Voĉo en la dezerto...

En « La Juna Batalanto » (majo), gazeto de junaj katolikaj pacistoj, aperanta en Kolonjo, jena kuraĝa k malkaŝa eldiro pri la stato en Germanio : « ... La registaro silentigas perforte ĉiun, kiu kuraĝas paroli », k pri la katolika junularo speciale : « ... seniluzie rigardante ĝin, ni konstatas, ke ni perdis batalon. Se nova milito prepariĝas, la katolika junularo en Germ. estos nek sufiĉe klarvida, nek sufiĉe forta por eviti ĝin... nova mondkatastrofo trovos ĝin nepreparita kiel 1914... »

Favore konstrastas tiu malkaŝa lingvaĵo kun la senprincipa servemaĉo de iu Teo Jung en la kolonoj de la « sendependa » organo de la esp. movado !

Kie la movado progresas.

En la bonaspekta « Svenska Arbetar Esperantisten » (Sveda Lab. Espetantisto) estas ĉiam interesaj artikoloj, parte en esperanto. Ankaŭ la recenza parto estas tre zorge prilaborata. Kompreneble ĉi-jare multaj notoj k artikoloj rilatas la SAT-Kongreson.

[1] Se ni bone memoras, la nomo de tiu en supra artikolo nenomita « Majstro » — la kioma Majstro aŭ Mesio mondsavonta li estas ? — estas *P. Danov*.

Post unu Semajno

aperos n-o 4/5 de **« Sennacieca Revuo»** kiel duobla numero kun riĉa enhavo bele ilustrita kiel ordinare. (Prezo : fr. 2.50).

SED, ĉu vi jam zorgis pri larĝa disvastigo de la *maja specialnumero* de nia revuo kun dukolora titolpaĝo k valoraj artikoloj ? Tiu ĉi numero estas ankoraŭ havebla por la prezo de 1.80 fr. por 1 ekz-o, 6 fr. por 5 ekz., 10.50 fr. por 10 ekz-oj.

Administracio de SAT, 23, rue Boyer, Paris XX.

ĈE LA LABORISTAJ ESPERANTO-ASOCIOJ

La likvidiĝo de S.E.A.

En la n-ro 404 de « S-ulo » ni sciigis, ke *Socialista Esperanto-Asocio* ŝanĝis sian nomon k fariĝis *Societo de Esperanto-Amikoj*. Hodiaŭ ni devas informi la legantojn, ke la organizo devis tute likvidiĝi. Komento superfluas. « Revolucio » ja okazis en Germanio.

Ekzamenoj de la Nederlanda L.E.A.

Partoprenis la unuan esp. ekzamenon aranĝitan de la Ekzamena Komitato de la Federacio de Lab. Esperantistoj, la 14-an de majo en Amsterdamo, 57 personoj, inter ili 49 por la diplomo A (praktika diplomo) k 8 por diplomo B (instrukapablo).

Voĉoj el Germanio[1]

...26-V-33. Kara amiko ! Hodiaŭ mi ricevis vian bildkarton, por kiu mi kore dankas al vi. Viaj sciigoj tre interesis min, ĉar mi ĝis nun ne sciis ion pri la amika kontrakto inter Stalin k Hitler. Estas terure. Nekredebla senkaraktereco ! En Germanio la kompartianoj estas mortbatataj, troviĝas en karceroj k internigejoj k tiuj uloj intertraktas amike. Oni povus malesperi ! !

K-dino, kiu oficas en sindikatoficejo, rakontis al mi jenon : Ŝi trovis sur sia labortablo inter aliaj aĵoj gazeton kun la titolo « Die Aktion ». Temas laŭdire pri jud-intelek-

[1] Ni atentigas la legantojn, ke pliaj voĉoj pri k el Germanio aperos en la n-ro 4/5 de « Senn. Revuo » (vd. anoncon !).

tula gazeto german-k franclingva, kiu aperas nuntempe en Elzaso. Leginte ĝin dum la tagmeza laborpaŭzo, ŝi forbruligis la gazeton en la loĝejo de fratino, konsiderante, ke iu kolego pro malzorgo forgesis kaŝi aliloken la presaĵon. Sentime la K-dino reiris en la laborejon. Subite la faŝista komisaro de l'koncerna sindikato invadis la ĉambrojn k kriis : « Kiu forprenis mian gazeton ? » Nu, ĉiuj ĉeestintoj silentis, kio sekvigis, ke la komisaro minacis arestigi la tutan oficistaron. Tiam la K-dino konfesis, ke ŝi havis la gazeton k forbruligis ĝin. Tion la faŝisto pridubis k venigis kelkajn kriminalpolicistojn, kiuj ekkaptis ŝin. La K-dino estis transportata en la policoficejon, dum unu el la kriminalpolicistoj iris en la loĝejon de ŝia fratino k traserĉis la forntruon, forportis la cindron k montris ĝin al la polica oficisto, kiu devis esploradi la K-dinon. Estis pruvite, ke ŝi diris la veron. Tamen ŝi ne tuj estis liberigata, ĉar... laŭ la dokumentoj, kiujn posedis la policistaro, ŝi estas kompartianino. Tute precize la policistaro estas informita pri la unuopaj okazintaĵoj en la politika vivo de la koncerna K-dino. Oni serĉis kaŭzon, por enkarcerigi ŝin, sed ne sukcesis, spite la provoko...

Al mi konata K-do dum la lastaj tagoj nur tial estas enkarcerigita, ĉar li antaŭ jaroj foje estis membro de la kompartio. Aliaj estas enkarcerigitaj dum kelkaj tagoj sen cito pri motivoj, do tre verŝajne nur pro tio, ke ili estis « rekomenditaj » (denuncitaj) de la karaj najbaroj. Speciale en laboristaj kvartaloj la denuncado floregas...

Interesos vin, ke en Germanio momente estas disvastigata de la kompartia opozicio (KPO) la unua bonega analizo pri la malvenko de l'germana laboristaro k la direktoj por la neleĝa batalo kontraŭ la faŝismo. Tiu tezoj aperis en la teoria organo « Kontraŭ la Fluon » (Gegen den Strom) n-ro 5, majo 1933. Estas germanlingvaĵo havebla en Strasburgo. En la laborejoj la proletoj kvazaŭ buŝkaptas ĝin kiel anseroj la pomkernaĵon. La neleĝaj periodaĵoj, cirkuleroj de l'oficiala kompartio, kiujn mi sukcesis ricevi ĝis nun, estis absolute senvaloraj. Jes, mi legis ilin, sed estas kvazaŭ mi scius nenion pri ili. Ili publikigis ŝablone la samajn idiotaĵojn kiel pli frue. Fanfaronaĵoj abundas. Ekz. la « Tribunal» (hektografita organo de l'malpermesita « Ruĝa Helpo ») raportis, ke el vilaĝo apud Ŝ. 4 komunistoj estis denove arestataj, kvankam ili nur mallonge antaŭe estis revenintaj el la « internigejo ». Oni kaptis ilin pro la krio « Ruĝfront' ». Kompreneble la « Tribunal » rakontis, ke tiuj estas kuraĝaj K-doj. Sed fakto estas, ke la 4 junuloj trafis tial ree en la manojn de l'policistoj, ĉar ili *ebrie* kriaĉis k insultis la faŝistan registaron. Mi sciiĝis tion de K-do, kiu loĝas en la sama vilaĝo k konas ilin. Sed eble estas pli interese konstati, ke la prezoj por nutraĵoj altiĝas, la labortempo plilongiĝas, edzaj virinoj estas maldungataj, la « sanktaj » promesoj de Hitler k K-io ne estas plenumataj, ne povas esti plenumataj, ĉar la faŝismo ja devas unuavice helpi al la interesoj de la grandkapitalistoj k-bienuloj. Estas klare, ke la plimulto de l' laboristaro k etburĝaro ne divenis la demagogian rolon de l' faŝista reĝimo, kiu grandanime pagigis la salajron por la festotago de l' 1-a de Majo, sed kiu ŝtelis el la poŝoj de l'subpremataj jam miliardojn per limdepagoj k aliaj metodoj. Bedaŭrinde la laboristaro ĝenerale en la nuna momento taksas la valoron de l' faŝismo laŭ la akirebloj en la fabrikoj ktp, k tute malatentas la grandegan danĝeron de l'faŝista *kulturreakcio*.

Kiel mi legis hazarde ĉi tie, en la urbo estas ŝanĝitaj la nomoj de 85 stratoj. Ĉi-lastaj nun portas la nomojn de faŝistaj herooj k eminentaj militbuĉistoj. Mi konstatas, ke multaj civitanoj ĉagreniĝis pri tio, ĉar ili nun tre malbone povas sin orienti. I.a. unu strato havas nun la nomon de faŝisto, kiu akcidentiĝis dum aŭtomobilveturo. Tiaj « herooj » estas honorataj !

Mi aŭdis, ke la firmo Boŝ maldungis 400 inojn edziĝintajn. Tio ne plaĉas al la nacisocialistinoj, kiuj troviĝas inter ili. Ili voĉdonis siatempe por Hitler en la espero havi poste avantaĝojn. La malo efektiviĝis. Boŝ konstruas novan grandan fabrikon. La konstruentrepreno nur ricevis la rajton konstrui, kondiĉe ke 200 laboristoj estu maldungataj favore al sama nombro da nacisocialistoj dungotaj.

En la Nigra arbaro estas multaj memstaraj meblistoj, ĉefe en la « Nagold-valo ». En la pli fruaj jaroj ili liveris regule kontraŭ kontanta mono al judaj entreprenistoj. Estas vere, ke ili devis labori por malaltaj prezoj. Pro tio ili ĉiam protestis k subtenis la Hitlerisman agadon k kompreneble pretis partopreni la kontraŭjudan bojkoton. La sekvo de tio estis, ke la judoj aŭ ne plu povas aŭ ne plu volas aĉeti ĉe ili, kio kaŭzis, ke ili nun estas senlaboraj. Fakte ili nun eksiĝis el la nacisocialista movado pro seniluziiĝo. Same fartas aliaj anoj de la meza klaso...

... 4-VI-33.

Karaj Gek-doj !

Havinte la bonŝancon forlasi la germanan teritorion por 48 horoj, mi profitas la okazon por skribi al vi. Ĉar ĉe ni en Germanio estas subpremita ĉiu libera pensesprimado k jam tute nenion oni povas skribi pri Germanio eksterlanden. Kiam iu konversacias iom laŭte kun sampensanto, li ĉiam devas observi la straton ĉiuflanken por ne riski la danĝeron esti tuj arestata. Da spionoj nun estas tiom en Germ., ke oni devas supozi en ĉiu homo « naciecan gardanton ».

Kiel oni endanĝeriĝas, neatente elparolante ion, pruvas jena okazintaĵo en Fr. Iu eldiris okaze de solenaĵo, kiam oni elpendigis la standardojn : « Jen oni denove elpendigas la ĉifonojn ! » Li celis la hokokrucajn standardojn. La viro estis samvespere arestita, kvankam li estis elparolinta la frazon tre mallaŭte.

La lab. organizojn oni radikale malpermesis, ilian propraĵon oni ĉiam konfiskis. Oni daŭre ŝvebas en danĝero, ke okazos hejmtraserĉo. Ankaŭ ĉe mi oni jam serĉadis en la loĝejo... Kompreneble mi antaŭe estis forportinta la « ŝtatdanĝerajn » librojn... Kiam domtraserĉas profesiaj policistoj, oni estas bonŝanca, ĉar ili kelkiom intence indulgas, sed kiam venas t.n. helppolicanoj, kiuj ja estas S.A.-anoj[1] ili ĉion radikale konfiskas. La germanaj brunaj idiotoj ne favore rilatas al esperanto ; ili nomas ĝin juda lingvo, kiu meritas esti disvastigata inter la sovaĝuloj de Aŭstralio, Ili ja estas tiom malsaĝegaj, ke ili ĉion malakceptas, kio estas iom internacieca...

Ion certan pri la politikaj kaptitoj oni malofte ekscias, ĉar pri tio oni severe sekretigas. El sufiĉe fidinda fonto mi aŭdis, ke ekzistas 3 klasoj laŭ traktado. Ĉiu pli malbona ol la alia. En la... a popoldomo, kiu nun estas S.A.-hejmo, troviĝas en la keloj multaj kaptitoj, kiuj povas esti vizitataj de siaj parencoj, sed tiuj vizitoj staras sub plej severa kontrolo. Tamen multo tragutas. La traktado en la... a popoldomo estas terura. La kompatinduloj estas tiom batataj, ke sur la tuta korpo estiĝas bluaj strioj de subhaŭta sango. Sed la kulmino estas jeno : Kiam iu estas reliberigata, li devas subskribi sciigon, ke manĝaĵo k traktado estis tre bonaj. Kiam iu rifuzas subskribi la sciigon, ĉar ĝi estas mensogego, li ricevas gumbastonan lecionon. La kaptitoj devas marŝi ĉiutage en la korto,

Por Ŝtopi la Breĉon

23. listo

Grupo Villejuif	fr. fr.	38.90
K-do 17 520	»	3.60
K-do Burgemeister (Amal)	»	2.50
Anonimulo (Danio)	»	100.—
Roterdama SAT-rondo	h. gd.	7.—
14 593 P. Krijt, Amsterd.	»	0.50
14 942 J.W. Minke, Amst.	»	1.—

kantante patriotajn kantojn k unu devas porti hokokrucan standardon... Mi loĝas en lernejo k povas observi la tiean vivon. La infanoj estas vere freneze naciecaj. Ili daŭre kantas naciecajn kantaĵojn, salutas jam de malproksime ĉiun S.A.- aŭ S.S.[1]-anon per « Vivu Hitler ! » k levita mano...

Sed la daŭraj promesoj pri laborhavigo ĝis nun nur estis k restis promesoj k ili restos promesoj. Sed diru nur unu vorton kontraŭ Hitler, k ili manĝegas vin ! Hitler estas la germana dio, li povus fari la plej grandan sensencaĵon, la popolo certe aprobus ĝin. 90% hodiaŭ blinde krias « Hajl Hitler » k firme kredas al lia evangelio.

Kio ajn okazu, mi almenaŭ per la koro k menso restos SAT-ano.

La bruna teroro

Depost la alveno de Hitler al povo : 400 murditoj, 60.000 batitoj, 350.000 ŝtelrompoj k perforto, ktp., 50.000 en karceroj, 40.000 en punejoj, kie ili estas malbone traktataj ! Eta kriplulo en Berlin estis batata k minacata de la faŝistaro, se li rifuzus diri la adresojn de aliaj komunistoj (en la karcero de General-Pape-strato). Sed li rifuzis dirante : « Vi povos bati min ĝismorte, sed mi restos komunisto k ne vendos miajn K-dojn ». — *M. S.*

Ekster nia Movado

Per la helpo de influhavaj personoj la *polaj* radio-stacioj ekkonsentis pri disaŭdigo de regulaj programo (lekcioj, koncertoj) pri k en esp-o.— En Germanio nuntempe neniu radio-stacio plu disaŭdigas informojn, kursojn aŭ eĉ nur la semajnan programon en esp-o.

Nuntempe (laŭ freŝdata enketo) esp-o estas instruata en *Britio* en 27 lernejoj ; en 14 popollernejoj (8 oficiale, 6 neoficiale) al 655 lernantoj (454 knaboj, 201 knabinoj) k en 13 altgradaj lernejoj (5 oficiale, 8 neoficiale) al 351 lernantoj (161 knaboj, 190 knabinoj).

En *Tasmanio* (Aŭstralio) esp-o estas instruata al infanoj neoficiale post la lerntempo en unu lernejo. La koncerna instruisto havas grandan klason.

Multaj abonoj finiĝas en Junio !

Ni petas renovigi abonojn k membrecon kiel eble plej akurate por eviti interrompon en la liverado. Prefere uzu por viaj pagoj unu el la sekvantaj poŝtĉekaj kontoj (ĉiuj je la nomo de S.A.T., 23, rue Boyer, Paris 20) :

Bruxelles	**n-ro 350**	**189**
S'Gravenhage	**n-ro 211**	**533**
Kopenhago	**n-ro 4**	**986**
Leipzig	**n-ro 85**	**148**
Stockholm	**n-ro 74**	**153**
Wien	**n-ro D-109**	**068**
Zagreb	**n-ro 41**	**448**
Zürich	**n-ro VIII-200**	**49**

[1] Anoj de l'nacisocial. Atak-taĉmentoj (milicanoj).

La ĝeneraldirekcio de l'aŭstriaj fervojoj aranĝis ekzamenon pri scio k parolkapablo en esp-o (aŭ alia dua lingvo) por konduktoroj, kiu estas ĉiujare ripetata, por ke la dejorantoj ne forgesu la lingvon. Anoncis sin en la stacioj Bruck 22, Graz 39, Wien 47, Amstetten 17, Linz 66 k Salzburg 2.

Laŭ « Germ. Esp-isto » la estraro de l'Germ. Esp-Asocio turnis sin al la nacisocialistaj regnaj ministroj (por interno k propagando), kun proponoj utiligi esp-on en la servo de l'nacia propagando, per eldono de flugfolioj, broŝuroj, radio-paroladetoj ktp. Rezulto de tiu elpaŝo ĝis nun ne estas konigita.

Memornoto

Represis el « S.R. » : *Rappel de l'Aube* Troyes, 6.5. (vivo en la ruĝa armeo).

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Signalen*, Stockh., 11., 18., 25.5., 1.6. ; *De Fakkel*, Amsterdam (rubr.) 18., 23., 27.5., 7.6. ; *A Vida Social*, Lisboa, 1., 15.5., 1.6. (paĝo, ankaŭ kun notoj el « S-ulo ») ; *Le Peuple*, Bruselo, 11.9., 26.12.32, 4.1.33 ; *La Wallonie*, Liège, 16., 18.3 ; *Le Prolétaire*, Liège, 4.2., 15.4. ; *Journal de Charleroi*, 4.2. ; *ITF-Bulteno*, Amsterd. (rubr.), aprilo, majo.

Pri SAT enpresis : *Nya Alvsborgaren*, Amal, 24.5. ; *Le Travailleur*, Belfort, 3.6. ; *La Patrie Humaine*, Paris, 2.6.

* * *

En la monata gazeto « Forban » (frisa-nederl.) aperas depost majo 1932 regula esp. kurso. — En revuo por vegetarismo k eŭgeniko (rumana) « Vegetarismul » (Bukareŝto) aperas regula esp. paĝo kun resumo de la enhavo.

* * *

« Renovacion », organo de l'hisp. socialista junularo, Madrid, 3.6., enhavas larĝan esp. rubrikon k raportas pri la SAT-Kongreso.

NIA POŜTO

Nigrulo. — Manuskr. « Interbatalo » ricevita.

7161. — « Pafiĝi » kiel metafora esprimo en la senco de « jetiĝi » ne estas malkorekta. Vd. « Plena Vortaro », p. 348 : *li pafis sin for* (= subite malaperis).

18.334. — Artik. pri skoltoj aperos.

A. Bentson. — Via abono finiĝas kun junio. 5 kr. ĝis jarfino al la Kopenhaga poŝtĉeka konto de SAT.

Recenzejo

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Okamoto-Rikici : Teorio de Socia Vivo. Evangelioj de Belismo, vol. 8.—. 37 p. Form. 12×18. Prezo : 0.25 jeno. Eld. Belisma Koopera Kulturejo, Tomiokamura, Ŝuntoo-gun, Ŝizuokaken, Japanio.

En ĉi tiu broŝuro la aŭtoro klarigas tiun parton de sia doktrino, kiu rilatas al la ekonomio. Li polemikas kontraŭ Marks rilate lian difinon pri valoro, prezo k distribuo de l'plusvaloro. Laŭ li ĉi lasta ne devus esti disdonata al la laboristaro, sed devus servi por kapitaligo. Li rekonas la neceson malplialtigi la labortagon por ebligi pli altan kulturon k vivfeliĉon de la tuta homaro. Kiu legis la antaŭajn volumetojn, scios taksi ankaŭ ĉi tiun.

Gvidilo pri Kopenhago. Ilustrita faldebla prospekto belaspekta kun koncizaj klarigoj. Senpage havebla ĉe Turistforeningen for Danmark, Vestre Boulevard 18, *Kopenhago*, aŭ Societo de Danaj Esp-istoj, Fredericiagade 6, *Kopenhago*.

Aŭstrio. Faldebla ilustrita prospekto, dediĉita al la Kolonja Esp. Kongreso de la Federacia Ministerio por Komerco k Trafiko, Wien, k eldonita de ĉi-lasta. Havebla ĉe Internacia Esperanto-Muzeo, Neue Burg, *Wien I*.

Jesus Amaya : Goethe. Bio-bibliografia studo en hispana lingvo (kun raciigita ortografio) verkita de esp-ista K-do el Meksikio. Eld. Brambila, Guadalajara, Jal., Méj. 1932. — 68 pĝ. Form. 11×17. Prezo neindikita.

KORESPONDADO

Ĉeĥoslovakio.

K-do *Emil Seidel*, Rosengasse 45, *Gablonz a. N.*, intersangas PI, PM, kĉl.

Germanio.

Kurt Schmeisser, Am Bahnhof 61-c, *Dahlen/Sa.*, interŝ. PM (el Germanio, malnov-germanŝtataj, Dancig, Saar), kĉl., pref. kun Sovetio. Certe resp. Ne sendos unue.

Hispanio.

K-do 29 j., fraŭlo, koresp. kun fraŭlaj SAT-aninoj el Germanio. Adr. : *M. Balaguer*, Avenida de Cataluña 2, *Tarrega*. Lerida.

Litovio.

J. Svilainis, *Moletai*, Videniŝkiai, koresp. k interŝ. L, PK, PI, esp. gaz. kun legantoj de « S-ulo ».

Portugalio.

Juna K-do dez. koresp. kun eksterlandaj Gek-doj, L, PI. Skribi al : *Sebastiao Nunes*, Rua do Paraizo 28, 1°, *Lisboa*.

Sovetio.

Esp. rondeto ĉe ĝardenkult. instituto (33 gestud. 18-25-j.) dez. kor. L, PI, kĉl. K-do *A.D. Borisoglebski*, urbo *Micurinsk*, poŝtkesto 24, Institut imeni Micurina.

Svedio.

La *Esperanto-klubo* en Dals-Langed aranĝos en julio letervesperon k petas alsendon de PK k L el la tuta mondo. Ni certe respondos. Skribu al : Esperanto-klubo E. Svantesson, *Dals-Langed*, Svedio.

Radio-programo

26.6 : 19.40-20.00 : Ljubljana, 576 m, kantoj kun esp. klarigoj (*samhore :* 3.7).

21.15-21.45 MET : Minsk, 1105 m. (*same :* 28.6).

28.6 : 22.35-22.55 : Warszawa, 1400 m, Krakow, 312,8 m, parolado.

29.6 : 22.07-22.30 (?) : Leningrad, 857 m, informoj.

8.7 : 15.15-15.30 : Turo Eiffel (Paris), 1445 m, parolado.

Kvar knabinoj

deziras korespondadi : Majken Olsson 16, Helny Karlson 19, Gertrud Karlsson 22, Olga Samuelsson 30, adr. : Malmön, OLOFSHOLM, Svedio

Helpu al la Komisiono, kiu preparas gravan ekspozicion pri la valoro de esperanto okaze de la Kongreso de l'

Sindikatara Internacio (F.S.I.)

per sendo de ĉiuspecaj esperantaĵoj, revuoj, prospektoj, ktp. !

Atentu, ke tiu ekspozicio estas oficiale konsentita de la estraro de la Internacio ! Ĉiu, kiu havas iom valoran materialon, kontribuu tiel al la venko de nia movado !

Adresu ĉion al *Esp. Laborista Grupo*, Maison des Tramwaymen, 17, rue du Poinçon, *Bruxelles* (Belgio).